N-ro 1 - 2009

Martinus Institut

# Kosmos

## La Kosmologio de Martinus

70-jara esperanta jubileo en Martinus-Instituto

**Martinus:**
Mensa suvereneco

**Erik Gerner Larsson**
Martinus I
Enkonduko



Esperanto

# En Kosmos en januaro 1939 Martinus rekomendis la uzon de esperanto kadre de la Instituto

*de Ole Therkelsen*

En la jaro 1932 fondiĝis la Martinus-Instituo per la eldono de la unua volumo de Livets Bog (La Libro de la Vivo). En la jaro 1933 eldoniĝis Kosmos, la revuo de la Martinus-Instituto. Jam en januaro 1939, nun antaŭ 70 jaroj, en Kosmos n-ro 1/1939, Martinus en dana lingvo skribis pri esperanto. Ankaŭ preleganto Erik Gerner Larsson skribis pri esperanto, kaj ne nur en la unua numero de Kosmos en 1939 sed en ĉiuj 12 numeroj dum la jaro li aperigis mallongan artikolon kaj en esperanto kaj en dana lingvo. Je la fino de ĉi tiu numero vi trovos la unuan.

**Martinus-citaĵo de 1939:** ”Kiel la legantoj eble jam vidis, la revuo Kosmos enhavas kolumnon kun teksto en la internacia komuna lingvo ”esperanto”. Ĉar multaj danoj uzas tiun lingvon kaj havas vastajn kunligojn kun esperantistoj en diversaj landoj, ni tiel malfermas fenestron al la granda mondo.

Por ne malfavori tiujn, kiuj ne komprenas esperanton, la artikolo ankaŭ aperas en la revuo en dana lingvo. Ambaŭ versioj aperas en la revuo tiel, ke sendamaĝe por aliaj tekstoj oni povas eltondi la artikolon por sendi ĝin al fremdaj esperantistoj.

Esperanto estas planita lingvo, konstruita de la pola kuracisto L. Zamenhof (1859-1917), kiu publikigis la lingvon sub la kaŝnomo Dr. Esperanto (esperanta homo) por tiel krei internacian helplingvon. Rilate al aliaj similaj lingvoj esperanto senkonteste havas grandajn avantaĝojn, kaj ŝajne estas la sola planita lingvo, kiu pruvis sian taŭgecon (i.a. en diversaj kongresoj).

Esperanto forte evoluadis, sed iom stagnis dum la unua mondmilito. Sed nun ĝi denove forte evoluas, kaj certe pro sia granda simpleco kaj facileco ĝi certe gajnos grandan lokon en la internacia evoluo.

En tia internacia laboro, kiu prezentiĝas pere de ”Livets Bog” kaj la revuo ”Kosmos”, esperanto ŝajne povas esti de grandega utilo kiel portempa ponto inter la dana lingvo kaj la fremdaj lingvoj, kiu estas parolita de eksterlandaj interesatoj de mia laboro. Pere de esperanto multe da interesatoj tra la mondo senprokaste povos kontaktiĝi kun mia laboro, ĉar ili ne bezonas atendi la estontan tradukon en la grandajn mondlingvojn.

Esperanto tiel estas ponto inter la dana kaj ĉiuj fremdaj lingvoj. La ĉino kaj ruso, la hindo kaj japano, same kiel ĉiu unuopa eŭropano pere de esperanto same facile trovos vojon al kompreno al tio, kion ni deziras skribi al ili en nia revuo. Tio tiel estas la unua eta klopodo serĉi atenton dise en la granda mondo.

Per tio komenciĝis nova suplemento al nia internacia laboro. Se la intereso estas sufiĉe granda, ni starigos esperanto-kurson kadre de la Instituto. Povos havi grandegan signifon por la disvastigo de mia verko, se kiel eble plej multaj de ĝiaj amikoj lernos esperanton.” (Kosmos n-ro 1/1939, p. 1-2).

*Esperantigita de Ole Therkelsen*

# Mensa suvereneco

de Martinus



**1. Iniciĝo kaj kosma konscio**
Kiel antaŭe rakontite mia spirita misio komenciĝis per iuj psikaj travivaĵoj, kaj la speciala strukturo de tiuj travivaĵoj estis io tute privata por mi mem. Tio, kio havas signifon por aliaj homoj estas tiu cirkonstanco, ke ili postlasis min en stato, kiu faris min kapabla ricevi ampleksan scion pri la tuta universo, ke eĉ la dia mondplano fariĝis komplete subigita al mia senskapablo, fariĝis maldorma tagokonscio. Mi ricevis kapablon sensi aferojn, kiuj neniel estas traviveblaj per nura fizika sensado. Mi vidis, kiel ĉiu limigita afero, senkonsidere kiun ajn grandecon ĝi havas, estas revelacio de la senfineco kaj sekve de la eterneco. Tiel la eterneco fariĝis videbla kiel la fiksa punkto, dum la tempo kaj per tio ankaŭ la spaco estas la moviĝa. Dum mi tiel estas konscia en la eterneco, mi fariĝis identa kun "la absoluta", "la nepereema" kaj vidis ĉiujn aferojn surbaze de "tio absoluta", "tio nepereema". Ĉar mi fariĝis konscia en la eterneco, estis identa kun la senmorteco, mi transvivis ĉian temponocion. Mi ekzistis kaj antaŭ kaj post ĉia ajn afero kaj sekve povis vidi kaj ĝian alfa kaj ĝian omega, ĝian komenciĝon kaj finiĝon aŭ ĝian tutan vivovojon. Kaj estas tiu travivadkapablo, kiun en mia ĉefverko "Livets Bog" mi nomas "kosma konscio", kiel ankaŭ, vidita de tiu observokapablo, mi nomis la priskribon de la detaloj de la vivo "kosmajn analizojn". Tiuj miaj "kosmaj analizoj" do estas observoj, kiuj ebliĝis pro mia liberiĝo de la tempo kaj spaco. Miaj psikaj travivaĵoj sekve estis procezo, kiu, por tiel diri, subite en mia konscio rezultigis tiun liberiĝon. Mi travivis "iniciĝon". Tra la menciita procezo okazis transformiĝo de mia konscio. Dum antaŭe mi estis konscia nur pri certa tempo kaj certa spaco, mi nun estis laŭ certa maniero konscia pri ĉiuj tempoj kaj ĉiuj spacoj. Dum antaŭ tiu travivaĵo mia konscio estis nomebla nur "loka konscio" ĝi nun fariĝis nomebla kiel "universala konscio". Kaj post tiu ŝanĝiĝo de konscio fariĝis por mi facila afero orientiĝi rilate al la sorto de la viva estulo kaj sekve ankaŭ rilate al la sorto de la tera homaro. Fariĝis facile afero por mi vidi, ke tiu tuta oceano da suferoj, en kiu la teraj homoj troviĝas, ŝuldiĝas ekskluzive al tiu cirkonstanco, ke ili ankoraŭ ne estas mense liberigitaj. Ili estas ankoraŭ ligitaj de la tempo, de la spaco aŭ de la materio. Ilia viv- kaj mondkoncepto sekve ne havas ion komunan kun la eterna vivo mem aŭ la reala mondplano. Tre altgrade ili povas konstitui nur lokan eron de la mondotuto mem. Sed koni aŭ sensi nur lokan eron kaj kredi, ke ĝi estas la tuteco, tio estas ja la samo kiel vivi surbaze de iluzio. Sed vivi surbaze de iluzioj estas plue la samo kiel vivi surbaze de eraroj. Kaj ĉar vivo bazita sur eraroj povas rezultigi nur malesperiĝojn, ni havas ĉi tie la kaŭzon, ke la ĉiutaga estado de la tera homaro estas vivo en malesperiĝoj, malĝojoj kaj suferoj.

## 2. Kial la tera homo reprezentas la morton anstataŭ la vivon

Sed en la estuloj malesperiĝoj, malĝojoj kaj suferoj ja estigas inklinon aŭ avidon trovi la kaŭzon de la mizero. Tial iom post iom la teraj homoj utiligas siajn spertojn. Dum la suferoj estigas en la estulo la kapablon distingi inter veraj agrablo kaj malagrablo, kio alivorte signifas, ke ĝi evoluigas la senton kaj mense kaj fizike, do la batalo por la estado estigas la inteligentokapablon en la konscio de la estulo. Kaj kun la evoluo de tiuj du grandaj kapabloj la estulo ne povas eviti, ke en ĝia konscio formiĝas kulturo. La evoluinta sento aperas en formo de kapablo de kompato kaj faras la estulon kapabla senti emon helpi aliajn vivajn estulojn, kiuj estas en mizero, dum la inteligentokapablo faras la estulon kapabla reguligi tiun kompatinklinon, tiel ke ĝi fariĝas logika. Tia harmonie reguligita kunsento kun aliaj vivaj estuloj estas la samo kiel tio, kion ni nomas "amon". Kaj la evoluo de tiu "amo" al ĉiuj vivaj estuloj sekve estas la provizora rezulto de la ĉiutaga tera vivo.

Sed samtempe kun tiu menciita "amo" evoluas ĉe la estulo ankaŭ ĝia liberiĝo el la materio. Ami sian proksimulon estas en la realo la samo kiel ami la vivon. En la realo ekzistas rilate al la viva estulo nur du eksteraj faktoroj, nome la materio kaj la proksimulo, kiuj plue responde estas la samo kiel la morto kaj la vivo. Ami la materion estas ja la samo kiel pensi pri la materio. Kaj tio, pri kio oni pensas, oni fariĝas, kio signifas, ke tio evoluas en onia konscio. Kiel menciite la materio estas la samo kiel la morto, kaj sekve oni evoluigas la morton en sia konscio, kiam oni amas la materion super ĉiuj aferoj. Kaj ĉu ne estis ĝuste ankaŭ tio, kio estis anoncita al Adam kaj Eva kiel sekvon de "la manĝado el la arbo de sciado"? – Kaj kio alia estas "la manĝado el la arbo de sciado" ol ĝuste superdimensia frandado de materiaj aferoj, materiaj bonaĵoj, same kiel responde superdimensia batalo kontraŭ same materiaj malbonaĵoj? – Ke iom post iom tia estulo havas en sia konscio nur pensojn pri materio, materio kaj senĉese materio, tio fariĝas memkomprenebla afero. Estas eĉ tiel, ke tia estulo fariĝas tiom envolvita en materio, ke pensoj pri la vivo povas nek flori nek evolui. Kaj kiel sekvo de tio ĝi ricevas nur kapablon por sensi materion. Ke tial tia estulo devas kredi, ke ĉio estas materio kaj sekve nur povas konstitui tempon kaj spacon, eĉ ankaŭ ĝi mem, kaj sekve estas subigita al absolutaj komenciĝo kaj finiĝo, tio ja konfirmas nur, kiel nekomprenebla por ĝi mem estas en la realo ĝia propra alta identeco kiel eterna aŭ senmorta estulo. Ĉar tiel ĝi ne povas observi la veran vivon mem, sed ĉie vidas nur materion, ni vidas ĉi tie, kiel fundamenta estas la kosma aŭ spirita morto de tiu estulo. Ĝi kredas pri si mem, ke ĝi estas nur aro da diversspecaj materioj, kaj la samon ĝi kredas pri "la proksimulo" aŭ pri ĉiuj aliaj estuloj. Ĝi konceptas la vivon ekskluzive kiel vicon aŭ serion da rezultoj de pezo kaj dimensio. Senfine ĝi diras pri la viva estulo, ke ĝi estas malbona, bona, malsana, sana, talenta, sentalenta, inteligenta, ĉarma ktp. Sed por la viva estulo ĉiuj tiuj esprimoj estas nur efemeraj aferoj. Ili havas komenciĝon kaj finiĝon kaj sekve estas nur provizoraj aperaĵoj. Sed provizoraj aperaĵoj neniel povas esti tutecanalizoj de eternaj aferoj. Ili povas absolute nur esti analizoj de lokaj okazaĵoj aŭ de io tute provizora en la regiono de tiuj eternaj aferoj. Kaj ĉi tie ni estas ĉe la vivrigardo aŭ mondkoncepto de la ordinara tera homo. Ĝi vidas nur lokaĵojn en la mondotuto kaj konceptas ilin kiel la tutecon. Estas tiuj falsaj tutecimpresoj, kiuj formas tiun mondon de iluzioj, kiu estas bazo de ĉia malharmonio kaj la el ĝi sekvanta stato de malĝojo kaj sufero,

kiu nuntempe konstituas la ĝeneralan farton de la tera homaro. Ke en tiu malluma kaj trista sfero de la ĝenerala farto oni komencas revi pri sfero, kie tute alie devus esti helaj kaj feliĉaj cirkonstancoj, esti harmonio aŭ vera paco, tio ne estas miriga. La viva estulo ne povas daŭre vivi kaj daŭre kredi, ke la vivo ne ekzistas. Estas ĝuste, ke ĝi sensas ion, kion ĝi nomas "vivaj estuloj", sed ĝi ne sensas la vivon mem en tiuj estuloj. Ĝi vidas nur la materikombinon, el kiu konsistas tia estulo, kaj kiu konstituas ĝian organismon, sed ĉar tiu estas subigita al komenciĝo kaj finiĝo, estas efemera, ĝi kredas pri tiu viva estulo, ke ĝi estas nur kreita afero, kaj per tio ĝi dokumentas sian propran nescion pri la reala vivo. Sed regiono, kiun la estulo ne konas aŭ kies ekziston ĝi ne konas, povas ja en ĝia konscio reprezenti nur "la morton". Kaj tiel okazas, ke la tera homo, kiu reprezentas la morton anstataŭ la vivon, estas la Adam kaj Eva senvivigitaj tra "la manĝado el la arbo de sciado".

**3. Per tiu juĝo, kiun oni juĝas al aliaj, oni juĝas sin mem**

Sed kiamaniere okazas, ke la viva estulo, kiu do estas eterna kaj sekve senmorta estulo, tute foriĝas de si mem, tute foriĝas de la reala vivo, eĉ tiel longe, ke ĝi kredas sin unu kun la materio kaj per tio kun la morto?

Kiam la viva estulo foriĝis tiel longe de la vivo, ke en la realo ĝi kredas sin unu kun la materio, kredas, ke iam ĝi ne ekzistis kaj same kredas, ke iam ĝi ĉesos ekzisti, do la kaŭzo estas ekskluzive aranĝo en la dia mondplano. Tiu stato de la estulo estas ekskluzive plenumo de eternaj leĝoj, sur kiuj la tuta universo aŭ mondotuto baziĝas. Tial la stato de ĉiu viva estulo estas hodiaŭ precize, kiel ĝi devas esti por povi pluevolui antaŭen al plenumo de tiu fina dia intenco, kiu estas ĝia antaŭdestinita celo. Riproĉi al la viva estulo, ke ĝuste hodiaŭ ĝi estas tia aŭ tia, estas manifestmaniero, kiun povas praktiki nur estulo, kiu ankoraŭ nenion scias pri la vera vivo. Tia manifestado estas ĝuste "la mortomarko de la senviva estulo". Estas tiu "senviva" estulo, kiu juĝas sian proksimulon "senviva" estulo kaj sekve faras tiujn eternajn vortojn vero, kiuj esprimas, ke oni mem estu juĝata per tiu juĝo, kiun oni aplikas al aliaj. Neniuj nome povas juĝi aliajn al iu alia vivo ol tiu, kiun ili mem reprezentas. Se iu diras pri alia homo, ke ĝi estas malbonulo, ĝi malkaŝas sin mem malbonulo, ĉar laŭ absoluta kompreno neniu estulo povas esti malbonulo, kiu alivorte estas bandito – malbona homo. Ĉiu homo, same kiel ĉiu alia viva estulo, reprezentas hodiaŭ la pinton de sia evoluo kaj troviĝas sur kunresponda evoluŝtupo. Tial ĝi povas esprimi aŭ manifesti sin nur tra tiuj specialaj kapabloj kaj talentoj, kiuj estas karakterizaj por la koncerna evoluŝtupo. Oni ne povas postuli, ke estulo manifestu sin tra kapabloj kaj talentoj apartenantaj al pli alta ŝtupo, kiun ĝi ankoraŭ ne atingis. Tial ĉiu, kiu prezentas tian postulon kaj riproĉas, se ĝi ne plenumiĝas, mem estas karakterizebla kiel malbonulo. Ĉiuj estuloj, kiuj riproĉas kaj malice juĝas la konduton de aliaj homoj malkaŝas precize sin mem kiel tion, pro kio ili juĝas aliajn. Ĉiuj juĝoj, ĉia malica kritiko kaj riproĉo povas esti nur rezulto de la spirita aŭ anima neperfekteco de la kritikanto mem. Nur anime neperfekta estulo povas manifesti malican riproĉon aŭ kritikon kontraŭ sia proksimulo kaj juĝi ĝin kiel anime neperfektan estulon, kaj sekve laŭ kosma rigardo ĝi malkaŝas ekskluzive sian propran animan neperfektecon. Per sia juĝo al aliaj ĝi sekve juĝas sin mem.

## 4. La mensa liberiĝo kaj la perfekta amkapablo

Tiel la viva estulo estas komplete ligita en sia propra imago pri la vivo. Ĝi juĝas ĉion surbaze de tiu imago. Sed ĉar tiu imago povas esti falsa, esti malvera, same kiel ĝi povas esti vero, povas esti esprimo de la reala analizo de la vivo, do dependas plene de tiu imago de la individuo, ĉu ĝi estas en kontakto kun la vivo, kun la realo, aŭ ĉu ĝi estas animita de malvero, animita de tute eraraj imagoj pri la vivo kaj sekve ankaŭ pri ĝia propra reala senmorta identeco.
Se ĝia imago pri la vivo estas absolute ĝusta aŭ centprocente en kontakto kun la realo, kun la vero, kaj tiu kontakto sekve fariĝis la fundamento de ĝia vivo, do ĝi sentadas ĉiujn realajn animajn aŭ spiritajn bonaĵojn kaj agrablaĵojn de la vivo, kiel ekz. liberiĝon de ĉia malĝojo, ĉagreno, vivapatio, venĝemo aŭ sento de kolero al la proksimulo, panenvio, interbatalo aŭ batalo por la ĉiutaga pano. En tiu situacio ĝi estas tute liberigita de la tielnomata "malbeno", kiu kondiĉis, ke Adam devas "manĝadi sian panon en la ŝvito de sia vizaĝo". La estulo sekve ne plu sentas iun ajn avidon pri ia posedrajto. Ĝi nome sentas la plej altan feliĉon, la plej altan ĝojon donante plene sian vivon por la proksimulo. Kaj pli granda plenumo de la diaj leĝoj ne ekzistas. Ĉu ne estas ĝuste dirite de la mondliberiganto, ke "neniu havas amon pli grandan ol tio, ke iu donus sian vivon por siaj amikoj"? – Ĉu ne estas la samo, kio konfirmiĝis de la sama granda "filo de homo", kie li diras: "... Vi devas ami vian proksimulon kiel vin mem" kaj aldonas, ke tio estas la plenumo de la tuta leĝo kaj la profetoj. Kaj ĉu ne en la biblia transdonaĵo ni plue informiĝis, kion Dio aŭ la Providenco mem opiniis pri tiu ampraktikanta kaj predikanta estulo per la vortoj: "Ĉi tiu estas mia filo, la amata, en kiu mi havas plezuron"? –

## 5. Estuloj, kiuj parolas kun Dio, kaj en kiuj tiu sentas agrablon

Tiel Dio do diskonigas sian kontentecon kaj ĝojon pro estulo, kiu amas sian proksimulon. Sed Dio estas ja la Providenco, la Providenco estas la naturo, kaj la naturo estas la fundamentaj fortoj de la vivo aŭ la ĉiutaga ĉirkaŭaĵo de la estulo. Ami sian proksimulon sekve signifas, ke per tiu amo oni metas tiujn fortojn en iun por oni mem plej altgrade favora vibrado aŭ moviĝo, kiu fine igas Dion, kiu alivorte estas la ĉirkaŭaĵo, malkaŝi la dian aŭtentecon de onia propra reala difila identeco en la menciitaj altaj vortoj: "Ĉi tiu estas mia filo, la amata, en kiu mi havas plezuron". Ĉu povas okazi al la viva estulo pli alta, pli bela kaj pli perfekta travivaĵo? – Ĉu ĝi ne estas la plej granda iniciĝo, kiu povas okazi al la viva estulo, ke la naturo, ke la ĉirkaŭaĵo, ke la ĉiutaga vivo fundamente formas sin kiel dian voĉon, kiu laŭ ĉiuj manieroj diras al la sama estulo, ke ĝi estas amata difilo, reĝo de spirito, de saĝo aŭ la sankta spirito? – Ĉu ne dum jarcentoj milionoj da homoj rekonis, ke "Jesuo Kristo estas sinjoro, al la gloro de Dio, la Patro". Estas eĉ tiel, ke ĉe tiu, kiu perfidis lin ni sentetas la dian laŭdadon. Kial alie li prenis sian propran vivon? – Ĉu ne same ni vidas, ke dum jarcentoj milionoj da homoj laŭdadis kiel ĉielan aŭ superteran estulon, kio alivorte signifas estulon, en kiu la dieculo sentas agrablon? – Kaj ĉu ne sammaniere ekzistas hodiaŭ milionoj da homoj, kiuj vivas en admirado kaj kultado de Mahometo kiel filo de la ĉielo? – Kio estas tio, kion ni ĉi tie vidas aŭ travivas? – Ĉu la laŭdado aŭ rekono de estuloj kiel diecaj, kiel perfektaj, kiel faras tiuj milionoj da homoj, ne estas la voĉo de Dio? – Kiel alie Dio devus diskonigi aŭ informi, ke tiu aŭ alia estulo estas "amata filo, en kiu li sentas agrablon"? – Ĉu oni ne kredas, ke necese estas io en la menso kaj konduto de tiuj

menciitaj estuloj, kio plaĉis al la homoj kaj estis el tia rava grandiozo, ke la homoj surgenuiĝis aŭ klinis sin al la tero pro tiu io ĉe tiuj estuloj? – Kaj ĉu tiu io ne estis ĝuste la amo al la proksimulo? – Kaj ĉu tiu amo al la proksimulo ne plue estas la samo kiel rezulto de plene supera mensa suvereneco ĉe tiuj estuloj? – Iliaj manifestaĵoj ne estis ripetado, kopiado aŭ imitado de aliaj antaŭaj aŭ samtempaj estuloj. Ilia tuta apero, iliaj scio kaj ordonoj, konsiloj kaj instrukciado estis absolute memstaraj kaj sekve suverena aŭ reĝa laŭ la plej profunda laŭlitera kompreno. Tiuj estuloj estis konsciaj "difiloj" laŭ pura formo. Ne estis aliaj super ili ol Dio. Sekve ili parolis rekte kun Dio kaj surbaze de Dio. Kaj en kontakto kun tio ili oferis sian vivon por la tera homaro. Pli granda disvolvo de amo ne estas manifestebla. Ili oferis sin plene por sia proksimulo. En tiu okazo la tera homaro estis tiu proksimulo.

**6. Tio, kion la amo al la proksimulo donas al siaj praktikantoj**

Sed kvankam unuavice por Jesuo de Nazareto tio signifis krucumon, la fundamenta rerespondo de la tera homaro al tiu amo al la proksimulo fare de la mondliberigantoj fariĝis la plej granda omaĝo, laŭdado kaj sindono, kiu entute iam estis manifestita sur la tero. Dezirante vidi, kion amo al la proksimulo donas al sia praktikanto, oni bezonas nur studi la teran vivovojon de tiuj tri grandaj mondliberigantoj, kaj ĉi tie oni ricevas la plej neskueblan brilan pruvon pri tio, kion vivo en amo al la proksimulo finfine donas al sia praktikanto. Ĉu ne ĉiu por si la vivo en la tera sfero de tiuj tri grandaj sanktaj estuloj estas fabelo tiel granda, dia kaj ĉiosuperbrila, ke ĝi neniel estas superigebla de io ajn. Ĝi do konstituas la plej altan formon de travivado de vivo, estas ja la kulmino mem de la vivo. Jesuo naskiĝis en stalo de fizike malriĉaj kaj nerimarkeblaj gepatroj, eĉ ekster geedzeco, li estis metita en kripon kaj entute apartenis al la plej malalta socia tavolo de la socio, li fariĝis metiisto, rilatis al "pekuloj kaj doganistoj" kaj al aliaj el la estuloj ignorataj de la granduloj de la socio, malriĉaj fiŝkaptistoj, la amoristino Maria Magdalene, kaj entute estis konsiderata kiel persono, kun kiu oni povas rilati nur plej sekrete, kiam oni apartenas al la edukita aŭ intelekta klaso de la socio kiel ekzemple Nikodemo, de tiu stato tiu persono, kiun la regantaj aŭ pli bonstataj rondoj de la socio konsideris aĉa, kreskis por fariĝi rekonita kaj kultata kiel Dio fare de milionoj da homoj tra jarcentoj. Tiuj aregoj de kultantoj havas en siaj vicoj reĝojn kaj imperiestrojn kiel ankaŭ ordinarajn civitanojn, riĉajn kaj malriĉajn. Ĉu oni povas imagi pli brilan fabelon? – Kiel tia devus esti manifestata por esti pli granda?

Se ni rigardas la teran vivon de la mondliberiganto Budho, ni vidas respondan dian fabelon, sed nur en kelkaj aliaj nuancoj aŭ koloroj. Ĉi tie ni vidas teran reĝofilon, naskitan en riĉaj kaj multekostaj ĉirkaŭaĵoj tiel longe for de malriĉeco kiel entute eblas, sed tamen tiom animita de ĉiorega amo al la proksimulo, ke por la juna reĝofilo ĝi fariĝis tute nekonformigebla kun liaj reĝaj privilegioj aŭ favorata aliro al ĉiuj socibonaĵoj en lando aŭ mondo, kie miloj kaj miloj da estuloj pene vivis sian vivon en grandaj sklaveco, malriĉo kaj mizero, tiel ke finfine li rezignis je ĉiuj tiuj bonaĵoj por povi esti inter la suferantaj kaj malĝojaj, la senhelpaj kaj perditaj kaj por per sia cerbo kaj koro esti ilia helpo en la mizero, esti ilia spirita lumo en la mallumo. Kaj kiel okazis por tiu estulo? – Ĉu ne ankaŭ ĉi tie ni vidas, kiel la fabelo levas tiun teran reĝofilon, kiu rezignis je siaj reĝaj privilegioj, sia reĝa titolo, sia privata vivo, siaj palacoj kaj riĉaĵoj, levas lin al nova reĝodigno kiel spirita reganto super regno, kiu

nuntempe nombras ĉirkaŭ 500 milionojn da animoj, regantoj kaj civitanoj, riĉaj kaj malriĉaj, kaj ke de tiu grandioza arego li estas honorata, laŭdata kaj kultata kiel Dio. Ĉu la fabelo ĉi tie povas estas pli granda?

Rilate al Mahometo, ĉu ne estas la sama dia fabelo, kiun ni renkontas ĉi tie, sed same kiel la aliaj du aperanta en sia propra speciala variaĵo aŭ nuanciĝo. Ĉu ne same ankaŭ li pro sia konscisinteno al la dieculo kaj tra ĝi al la zorgo pri la feliĉo de siaj kunhomoj fariĝis nuntempe reĝo de la spirito, laŭdata, kultata kaj admirata de milionaro, por kiu lia speciala intuicio kaj koncepto estis la vojo al la lumo kaj sekve al pli alta formo de travivado de la vivo?

La amo al la proksimulo estis la neskuebla fundamento por la vivo de tiuj estuloj, kaj tial ni havas en la historio, vivo kaj sorto de tiuj estuloj la plej fundamentajn kaj sekve la plej nerefuteblajn pruvojn pri tio, ke amo al la proksimulo estas tiu absoluta manifestoformo, kiu kondukas sian praktikanton al la plej alta formo de travivado de la vivo aŭ la plej dia fabelo, kiu entute estas manifestebla kiel vera reala fakto. Konduto de totala amo al la proksimulo do donis al la mondliberigantoj plenan mensan suverenecon, kio signifas totalan konscian memstarecon kaj la el ĝi sekvantan spiritan kaj fizikan liberecon kaj sendependecon plus omaĝon, laŭdadon kaj kultadon aŭ amon de tuta mondo tra jarmiloj. Kiuj aliaj konscimanifestaĵoj aŭ formoj de konduto povas elmontri, ke ili donis al siaj originoj kaj praktikantoj tiel brilan rezulton?

**7. Kiam potenco, torturo, morto kaj subpremo estas praktikataj anstataŭ amo al la proksimulo**

Estas ĝuste, ke ekzistis homoj, kiuj per aliaj de la amo al la proksimulo deviaj formoj de manifestaĵoj, kio pli aŭ malpli signifas malamajn kaj sekve militemajn, ravis la homojn kaj igis ilin kulti sin, sed kie estas nuntempe la reganteco de tiuj estuloj? – Ĉu ne la historio de ĉiuj personoj de la pasinteco paliĝis kompare kun tiu de la mondliberigantoj? – Kion signifas bela reĝa mantelo kaj krono kaj sceptro kaj la omaĝo de iu granda popolo, kiam tiu tuta ravo estas konservebla – ne per amo al la proksimulo – sed per kruda potenco aŭ subpremo, pere de soldatoj, mortigiloj, malliberejoj, torturo kaj mortpuno? – Kiu el la estintaj grandaj neinicitaj faraonoj, reĝoj aŭ imperiestroj aŭ aliaj neinicitaj grandaj povis postlasi tian aŭtoritatecon, ke ili povis daŭre regi homojn kaj regnon tiel, ke dum jarmiloj ĝi kreskis kaj kreskis sammaniere kiel la regnoj de la mondliberigantoj?

Ĉu la regno de la mondliberigantoj ne estas la plej granda reĝoregno en la nuna tempo, kaj tamen pasis jarmiloj post la tempo, kiam tiuj regantoj forlasis la fizikan sferon. Kiu materia reĝo, kies potenco estas bazita sur armiloj, sur soldatoj kaj mortigiloj, povas elmontri ion nur parte similan? – Ĉu ili ne ĉiuj iris la vojon de ĉiu karno?

Nur kelkaj tombaj monumentoj, kelkaj pli aŭ malpli forviŝitaj hieroglifoj plus sunsekigitaj kaj vetermorditaj ruinaĵoj en la dezerta sablo nuntempe rakontas la grandan nestabilecon aŭ efemeron de tiuj estuloj kaj iliaj regnoj. Ilia brilo estis iluzio. Ĝi ne estis suna lumo, kiu brilis sur justaj kaj maljustaj. Kontraŭe ilia domina potenco sur la terhoma mensa ĉielo estis malhelaj nuboj, kiuj mallumigis la sunon kaj kovris ĉion per veteraĉo, fulmo kaj tondro por post tio senspure malaperi. Hodiaŭ ili estas for same kiel la nuboj, kiuj transflugis la ĉielon hieraŭ.

Ĉi tie ni vidas sur la terhoma mensa ĉielo, kiel la grandaj reĝoj kaj iliaj regnoj, kiuj estas bazitaj sur amo al la proksimulo, estas daŭra suna lumo, kiu daŭre brilas kaj lumas sur justajn

kaj maljustajn kaj laŭ responda grado restas, dum ĉiuj reĝoj kaj regnoj, kiuj estas bazitaj sur potenco, mortigado kaj korpodifektado, same kiel nuboj de veteraĉo ne havas en si ion daŭran aŭ nepereeman. Ili forŝovas kaj detruas ĉian mensan liberecon kaj sekve mem detruiĝos. Tiel la ruinoj en la dezerta sablo montras, ke la grandaj subpremantoj semis morton kaj pereon kaj sekve same neskueble devis rikolti morton kaj pereon. Kaj ĉu ne ĝuste antaŭ nelonge ni vidis la saman dramon ludatan antaŭ niaj nunaj fizikaj okuloj? – Ĉu ni ne vidis personojn, kiuj flamigis preskaŭ la duonon de la mondo al fanatika kultado de ili mem kaj de iliaj metodoj kaj principoj, kiuj en pura formo kaj pere de perforto, potenco, teroro kun la por tio aranĝitaj torturiloj, gaskameroj kaj pafiloj ktp. estis subpremado en pura formo kaj ekstermado de alie pensantaj. Iliaj regnoj fariĝis popoloj el sklavoj kaj sklavpelantoj, fariĝis ĉioampleksa malliberejo, en kiu ĉia terhoma individueco kaj memstareco devis ruiniĝi aŭ ekstermiĝi. Pli granda kontrasto al la amo al la proksimulo ne estas montrebla, manifestebla aŭ atingebla. Kaj kia fariĝis la rikolto? – Kie ili estas hodiaŭ, tiuj individuoj avidantaj la mondregantecon, kiuj en sia propra sinkultado erarvagis en la malsaĝecon kredi, ke ili povas krei feliĉan mondon, povas rikolti ĝojon kaj benon semante morton kaj pereon, brutalecon, korpodifektadon, torturon kaj forigadon de ĉio, kio estis al ili kontraŭa. Ili kredis povi rikolti liberecon kaj memstarecon por si mem kaj por siaj amikoj ligante kaj katenante aliajn homojn. Ili ne komprenis, ke per tio ili envolvis sin mem en volvaĵon de karmo, kiu faros kaj ilin mem kaj iliajn popolojn la plej mizeraj, la plej ligitaj kaj katenitaj, la plej korpodifektitaj kaj torturitaj homoj en la mondo. Ja eĉ ne la vivo en mizera kaj obskura karcero estis donita al la antaŭe tiel impetantaj kaj aljubilataj mondaj mastroj. Terurigita unu fuĝis de tiu mondo, kies mastro li preskaŭ kredis esti aŭ fariĝi, dum alia estis atingita de tiu morto, kiu en multege da okazoj li donis al sia proksimulo. Kaj kio por la servantoj kaj la helpantoj? – Ĉu ne poste iliaj juĝistoj kondukis ilin al la militkrimula eksekutejo, dum malsatanta kaj frostanta, ĉifona kaj nuda la cetera popolo lamiris ĉirkaŭe en ruinamasoj de iliaj antaŭe tiel fieraj urboj, palacoj, reĝokasteloj, preĝejoj kaj katedraloj, universitatoj kaj aliaj instruejoj, akre gardita, malliberigita kaj ligita de tiuj popoloj, kiujn ili mem intencis ligi?

**8. La kulmino de la tera homaro en materiisma scio, kaj la el tio sekvanta kosma morto**

Kio estas tio, kion la vivo, la naturo aŭ Dio ĉi tie mem malkaŝas aŭ diras al la homoj? – Ĉu ne estas realisma averta serioza parolo al ĉiuj, kiuj hodiaŭ havas la samajn aŭ parencajn egoismajn revojn? – Ke eble tiuj revoj pli aŭ malpli estas nekonsciaj, ĉar en tro fekunda egoismo kaj sinkultado la koncernaj estuloj sugestiis sin mem por kredi, ke tiu ilia tuta naturo, tiu ilia inklino al subpremo al la proksimulo, al aliaj homoj kaj ŝtatoj estas – idealismo, estas "savo de la mondo", estas la vojo al la absoluta paco, tio ne ŝanĝas la ĉiondetruan kaj ruinarkrean potencon de tiuj revoj. Neeviteble ili kaŭzos malĝojon, malsanon kaj mortodoloron kaj al ilia farinto kiel al ties adeptoj kaj helpantoj. Ĉu oni ne kredas, ke tiuj, kiuj ekstermas per atombomboj, ankaŭ mem ekstermiĝos per atomaj bomboj? – Ĉu ne en tiu monstro ni havas antaŭ ni precize la principon de glavo en mil- aŭ milionopa grandiĝo? – Ĉu oni kredas, ke oni povas eviti la leĝon de amo al la proksimulo farante "la glavon" pli efika? – Ĉu oni kredas, ke la atombomba tondrego kaj inferaj flamoj sur la ĉielo super detruitaj popolamasoj kaj kulturaĵoj de iu urbo

estas interpretebla kiel laŭdado al ĝia farinto fare de Dio? – Ĉu en tiu infera manifestaĵo troviĝas io, kio esprimas pri ĝia farinto: "Ĉi tiu estas mia filo, la amata, en kiu mi havas plezuron"? – Ĉu ne la atombombaj flamantaj polvonuboj super Hiroŝimo kaj Nagasako estis kulmino de la plenumo de la dia promeso pri tio, ke tiu, kiu manĝas el la arbo de sciado, devas "morti la morton"? – Kie estas la saĝo en ĉi tiu "infero", kiu envolvis la du urbojn kaj eble ankoraŭ nevideble furiozas sur iliaj ruinejoj aŭ postlasitaj terenoj? – Ĉu ne precize estis kompleta manko de saĝo, kiu kondukis la du urbojn al pereo? – Kaj ĉu ne estis la sama kompleta manko de saĝo kaj la el tio sekvanta sklavligita menso, kiu kreis la malsaĝan aŭdacon utiligi la atoman forton kontraŭ la vivo mem kaj ĝiaj kulturbonaĵoj? – Ĉu tio ne estas la plej alta formo de primitiveco aŭ kompleta nescio pri la plej interna naturo de la vivo mem samtempe kun fabela, ja eĉ superdimensia scio pri materia energio? – La tera homo tiom troglutis de la fruktoj de la arbo de sciado, ke ĝi nun ne plu estas inter "la vere vivantaj". Kaj tial ĝi ne povas vidi la veran vivon, la reale vivantan. Ĝi vidas nur energion, energion kaj denove energion, kiu plue estas la samo kiel materio. Ĝi kredas, ke ĝi mem estas materio. Ĝi kredas, ke la proksimulo estas materio. Ĝi kredas, ke la universo aŭ la mondotuto estas sole nur materio. Ke malantaŭ la materio devus ekzisti io alia kaj pli, kio ekzemple ekzistus kiel ties mastro, tion ĝi ne povas vidi. Kaj estas tiu totala anima aŭ kosma blindeco aŭ sensmalriĉeco, kio estas la samo kiel la vera aŭ la reala morto.

**9. La ordinara morto ne havas ion komunan kun la reala morto, sed kontraŭe estas fenomeno, kiu malkaŝas la nepereemon de la vivo**

La morto sekve ne estas, kiel kredas milionoj da homoj, tio, ke oni perdas sian fizikan korpon. Kontraŭe. Neniel tio havas ion komunan kun la reala morto. La reala morto povas ekzisti nur kiel perdo de scio kaj la el tio sekvanta perdo de intelekta kapablo. Sed, ĉar estulo perdas sian fizikan korpon, ĝi ja ne perdas sian scion aŭ sian intelektan kapablon, kvankam provizore ĝi estas haltigita en sia fizika povado. Tial la reala morto povas esti nur situacio, en kiu degeneras la kosmaj spiritaj kapabloj de la estulo, kaj en kiu la el tio sekvanta manko de kapablo por kompreni regas la individuon. Nur la kulmino mem de tiu perdo de spiritaj kapabloj aŭ intelekteco povas esprimi la absolutan morton. Ĉiuj aliaj ekzistantaj formoj de perdo de sensoj kaj spiritaj kapabloj estas nur tute provizoraj lezoj, ŝiroj aŭ vundoj faritaj en la batalo por la ekzistado, kaj kies saniĝo tra la vivoj estas absolute neevitebla kaj sekve nur demando de tempo.

En la ĉiutaga vivo ni do havas du specojn de perdo de konscio, nome unuflanke la provizoran aŭ akutan perdon estigitan en la batalo por la ekzistado, kaj aliflanke la kronikan perdon de konscio, kiu aperas en formo de la kapablodegenero, kio ĉi tie signifas perdon de spiritaj kapabloj, kiu ne estiĝis laŭ nenatura maniero per korpodifektado, malzorgo de la organoj aŭ alimaniera malobeo al la vivoleĝoj. La unua formo de perdo de konscio aŭ kapabloj estas plejparte karakterizebla kiel tiu uzdifektiĝo de la organoj, nervoj kaj sekve de la sensoj, kiun necesigas la ĉiutaga sinkonserva instinkto aŭ batalo por la ekzistado. Difektiĝo de okuloj, oreloj, brakoj kaj gamboj kiel ankaŭ de internaj organoj kiel stomako, intestoj, pulmoj, koro kaj cerbo ktp., ja tute ĝis la

tiel nomata morto aŭ de tempo al tempo kompleta difektiĝo de la tuta fizika organismo, ke ĝi ne plu estas konservebla de la mio, do estas nur provizoraj naturaj difektaĵoj, kiujn neeviteble sekvigas vivo en la zono de la mortiga principo aŭ la hejmloko de la milito por tiuj rimedoj, kiujn la mio devas apliki en tiu batalo por la ekzistado. Kaj ĉar la fizika organismo de la viva estulo estas ekskluzive tia rimedo, la mio neniel povas eviti influon al tiu rimedo fare de la materioj, fortoj kaj energiformoj, kiujn ĝi klopodas ĵongli pere de tiuj rimedoj. Sed en formo de la reenkarniĝo ĝi havas kapablon konstrui novajn korpojn laŭ eluzo de la malnovaj, kaj sekve neniu leziĝo, uzdifektiĝo aŭ kompleta pereo de la fizika organismo de la estulo povas fariĝi io alia ol certa provizora surfaca okazaĵo, kiun ĝi relative rapide anstataŭigas per konstruo aŭ riparo de tute nova korpo aŭ nova organismo, kaj tiel daŭre. Ĉi tie montriĝas fakto por la evoluinta esploranto, ke tio ne havas ion komunan kun la morto, sed kontraŭe plej altgrade malkaŝas la nepereemon de la vivo.

**10. La vera morto estas nerimarkebla kaj traviviĝas nur kiel speciala konscisekcio en la eterna vivkoncepto de la individuo**

La ordinara tiel nomata "morto" aŭ tiu "morto", kiu anonciĝas en la mortoanoncoj de la gazetoj, do estas nur provizora, necesa, praktika aranĝo aŭ principo de konservado. Koncerne la veran morton, do ĝi estas tiel milda kaj kaŝita, ke en la realo ĝi estas observebla kaj videbla nur por la evoluinta esploranto. La kaŭzo, ke tiu morto estas tiel milda kaj nerimarkebla en siaj transiroj, estas ekskluzive, ke ĝi ne estas sekvo de iu ajn katastrofo aŭ korpodifektiĝo kaj ankaŭ ne estas sekvo de iu ajn uzdefiktiĝo aŭ maljuniĝo. Kontraŭe ĝia ekzisto ŝuldiĝas al eterne ŝanĝiĝanta ritmo, kiu aktiviĝas tra la praavido de la individuo kaj en la ekstero aperas kiel responde eterne ŝanĝiĝantaj "malsato" kaj "satiĝo". Ĝi havas sian eliron en la superkonscio de la mio, kio signifas en ĝia X2 kaj realiĝas kiel grandioze kreskanta avido travivi la malon de tiu vivo, en kiu provizore troviĝas la menciita mio. Tiu avido sekve estas ju pli forta, des pli eltravivinta aŭ satigita la mio aŭ la estulo estas pri ĝia nuntempa vivo. Tiu avido do etendas sin antaŭen al sia kulmino por post tio reduktiĝi kaj veni en sian plej malgrandan stadion de disvolvo tie, kie ĝi komenciĝis, post kio ĝi denove pliiĝas survoje al sia kulmino kaj tiel daŭre. Estas tiu ritma moviĝo tra la praavido, kiu en mia ĉefverko Livets Bog nomiĝas la evoluspiralo aŭ la ciklo.

**11. La naturhomo vivas pli en maldorma tagokonscia kunvivado kun Dio kaj sekve kun la reala vero ol faras la moderna kulturhomo**

En tiu ciklo la tera homo sekve troviĝas en la zono de morto. Ĝi ne plu havas tagokonscion sur la kosma sfero. En formo de sia instinkto la naturhomo havas ankoraŭ kelkajn restaĵojn de tiu estinta "kosma konscio". Tra tiu instinkto ĝi ankoraŭ sentas, ke necese estu io viva kaj gvida malantaŭ ĉiuj moviĝoj, malantaŭ la ŝtormo, malantaŭ la disondaĵo, malantaŭ la kresko de la arboj, malantaŭ la sortoj de la vivaj estuloj, malantaŭ la suno kaj steloj kaj malantaŭ la universo. Tia naturhomo neniel povas imagi, ke tio ne estu la fakto. Ĝi nur ne havas tiom da inteligento aŭ intelekteco, ke ĝi povas krei por si tute sciencajn tagokonsciajn analizojn pri la kosma flanko de la vivo mem. Sed tra sia instinkto kaj ankoraŭ nur malmulte evoluinta inteligento ĝi tamen povas tra fizikaj imagoj fiksi ĉe si tiujn kernajn rezultojn, kiuj estas analogaj al ĝia propra provizora naturo. Kiel ĝi mem koleriĝas, ĝi opinias, ke ankaŭ

la Providenco koleriĝas kaj punas aŭ venĝas sin je siaj malamikoj, kaj responde tiu Providenco kompreneble estas supozata rekompenci kaj favori siajn amikojn precize, kiel ĝi mem punas kaj rekompencas. Nur laŭ tiu neperfekta maniero la naturhomo povas koncepti kaj esprimi la leĝon de karmo mem.

Kvankam ne laŭ alia maniero ĝi povas komprenigi al si la ĉiutagajn travivaĵojn, tio tamen montras, ke ĝi povas koncepti la naturon ekskluzive kiel agojn de "viva estulo" aŭ esprimon de vivo. Kio estas do pli nature, ol ke ĝi koncepti tiun vivon precize analoga al sia propra vivo, nur laŭ multe pli granda kaj pli potenca aŭ ĉiorega apero. Kompreneble sur tiu stadio ĝi kreas dieculojn laŭ sia propra bildo. Sed ĝi vivas surbaze de tiu dibildo. Ĝi donas bazon por ĝiaj idealoj, moralo kaj konduto, ĉar estas absolute neeble por la estulo opinii, ke tiu viva estulo kun siaj multe pli grandaj potenco kaj influo povas fari tiujn erarojn, al kiuj ĝi mem estas subigita. La naturhomoj de la sovaĝvastoj aŭ praarbaroj sekve vivas fundamente surbaze de nemalhavigebla dinocio, kredas je ekzisto de nevideblaj estuloj, spiritoj aŭ dioj malantaŭ la vivo kaj ĝiaj energi- aŭ movospecoj. Tra tiu sia granda instinkto ĝi do estas nedisigeble ligita al tiu sia dinocio. Ĉu sub tiu dinocio ĝi konceptas unu dion aŭ plurajn diojn, ĉu ĝi kredas, ke tiu dio aŭ tiuj dioj havas tian aŭ alian aspekton, aŭ ĉu ili aperas laŭ tiu aŭ alia maniero, tio ne ŝanĝas la principon. Tia estulo vivas pli en konscia kontakto aŭ en maldorma tagokonscia kunvivado kun Dio ol la en la spiralciklo multe pli progresinta moderna kulturhomo, kiu havas grandegan scion pri la materio, alivorte havas scion pri movospecoj, rapidecoj, mezuro kaj pezo, tempo kaj spaco, sed komplete neas vivon aŭ providencon kaj per tio konscian intelektan gvidadon malantaŭ ĉiuj tiuj movoformoj aŭ logikaj kreospecoj, el kiuj la naturo konstituas oceanon.

### 12. La naturhomo kaj la kulturhomo en rilato al la kosma morto

Ke ekzistu Dio, viva pensanta giganta estulo malantaŭ la materio kaj havanta la universon aŭ la mondotuton kiel organismon, tio estas nekomprenebla por tia tre forte materioscience sintena estulo. Ĝi vidas nur la morton. Ĝia rekono de vivo etendas sin en la mikromondo nur al tio, kion per siaj fizikaj okuloj kaj iliaj plilongigo en formo de mikroskopo ĝi povas observi kiel vivajn estulojn, kaj same la limo supren al la makrokosmo estas jam ĉe la identeco de ĝia propra speco kiel kulmino de la vivo mem aŭ plej alta limo por la vivaj estuloj. Envere tre mikroskopa vivpanoramo, kiam oni imagis, kiel grandegaj distancoj kaj spacoj troviĝas inter la videblaj montoj kaj sunurboj sur la nokta ĉielo kaj pri tio, kiel mikroskope eta polvero estas la terglobo mem en tiu abunda aŭ senlima panoramo. Ke tia eta vivero kiel la tera homo devus esti la plej alta reprezento de vivo en tiu panoramo, kie pro sia eteco eĉ tiu terglobo, sur kiu ĝi troviĝas, malaperas en la universo kiel nura polvero, tio povas esti absolute nur la samo kiel vidi la morton ĉie en la universo, tio povas esti nur kultado al tiu morto anstataŭ al la vivo. Ne estas mirige, ke la mondliberiganto diris: "Feliĉaj estas la malriĉa en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo". La naturhomo scias nenion pri la rapideco de la lumo, ĝi scias nenion pri la ligado de la elementoj en fortomaŝinoj, per kio oni povas fari sin mastro super tiuj elementoj. Ĝi ne povas pesi la sunon aŭ science mezuri la iron de la steloj. Ili ne povas manovri per la atoma forto aŭ komprenigi al si la vivon de molekuloj kaj ĉeloj aŭ laŭ perfekta maniero ĵongli aliajn el tiuj materiaj aferoj, pri kiuj specialiĝis la kulturhomo, sed ĝi ankoraŭ vivas

en stato, kie ĝi povas turni sin al Dio aŭ viva providenco kun siaj ĉagrenoj, same kiel ĝi lasas tiun providencon fiksi moralon kaj karakteron samtempe kun tio, ke ĝi klinas sin en la polvon por tiu absoluta fundamento de la vivo. Tial ĝi tute ne konas tiun sferon de malesperiĝo kaj nervorompiĝo, en kiu laŭ grandega skalo la kulturhomo suferas. En la naturhomo kaj la kulturhomo ni vidas konfirmon de tiuj efikoj, kiuj devis fariĝi la rezulto de la manĝado el la arbo de sciado. Ni ĉi tie vidas, kiel la estuloj manĝas el la arbo de sciado kaj "mortas la morton". La naturhomo ne estas "kosme konscia", sed do vivas en instinkteca sento de la ekzisto de la Providenco aŭ Dio ĝis tia grado, ke ankoraŭ tiu Dio decidas pri ĝiaj moralo kaj konduto. Tial ĝi ne estas tute "kosme viva", sed ankaŭ ne tute "kosme senviva". La kulturhomon ni kontraŭe vidas kiel estulon, kiu estas komplete "kosme senviva". Tra ĝiaj bestaj inklinoj kaj talentoj malkaŝiĝas, ke ĝis certa grado ĝi estas ankoraŭ naturhomo, kaj ke ĝi diferencas de tiu nur per siaj forte evoluintaj intereso kaj kapablo rilate al – ne la vivo – sed la morto, kio estas la materio aŭ la senvivaj aferoj, kaj per sia kompleta manko de kapablo kredi je dieculo samtempe kun tio, ke ne ekzistas iu fiksita limo, sed nur tre delikata laŭŝtupa transiro tiel delikata, ke ne eblas diri, kie finas la naturhomo kaj kie komenciĝas la kultura homo, tra ĉio tio montriĝas fakto, ke la kultura homo nur estas naturhomo pli progresinta en la kosma spiralciklo. Sekve la naturhomo nuntempe survojas estiĝi kulturhomo, kio signifas, ke laŭgrade ĝi perdas sian kapablon kredi je Dio, sian kapablon kredi, ke ĉio estas viva. Ĝi sekve estas perdanta sian kosman terenon, sian kosman senton aŭ instinktecan senton pri sia propra senmorta vivo aŭ sia eterna ekzistado. Pli kaj pli ĝi komencas kredi je la morto, je sia propra fina kompleta ĉeso, same kiel pli kaj pli ĝi kredas, ke iam ĝi kreiĝis sammaniere kiel estas kreita ĉia alia kreita afero, kaj sekve estas identigebla nur kiel provizora materikombino, kiu denove solviĝos.

**13. La du principoj de travivado: "La arbo de vivo" kaj "la arbo de sciado"**

La kulturhomo do estas "mortanta" estulo. Kaj estas la kulmino de tiu totala morto, kiu ĉi tie faras la estulon glacie malvarma, dineanta egoisto aŭ centprocente materiisma estulo. Kaj kio estas tio, kio kaŭzis tiun transformiĝon de la naturhomo al kulturhomo aŭ de la "viva" estulo al "senviva" estulo? – Ĉu ne estas la tiel nomata moderna civilizo? – Ĉu ne estas ĝi, kiu penetras en la pacajn pacifikajn insulojn kaj ĝangalajn terenojn kun siaj rafinitaj modernaj bonaĵoj kaj malbonaĵoj, siaj teknikaj aranĝoj kaj samtempe kun siaj mortigaj teruraj malvirtoj kaj malsanoj. Ĉu ne tiuj malvirtoj kaj malsanoj venenis kaj subfosis la parte ankoraŭ konservitan "paradizan" atmosferon de la indiĝena loĝantaro? – Kaj ĉu ne kontraŭe tiuj homoj estas ravitaj kaj interesitaj pri la teknika kaj kemia povo de la kulturhomo? – Ĉu ne estas tiu moderna sorĉo: fortomaŝinoj, aŭtomobiloj, flugmaŝinoj, filmo, radio, elektra lumo kaj ceteraj rezultoj de la materiaj scio kaj povo, kiuj metas grandegajn ĝermojn de sopiro en la junajn generaciojn de tiuj popoloj? – Ĉu kun tiaj ĝermoj de sopiro en la menso ili povas resti la samaj homoj kiel ĝis tiam? – Kaj kio estas do tio, pri kio ili sopiras? – Kiu estas tiu apetito, kiun sekvigas en la menso de la naturhomo la renkontiĝo kun la civilizo? – Ĉu ne estas ĝuste la manĝado de la arbo de la sciado? – Ĉu ne la grandioza povo de la kultura homo iom post iom fariĝas idealo kaj celo por la junaj filoj kaj filinoj de la praarbaro kaj sovaĝvastoj? – Kaj sur kio alia estas tiu grandega scio bazita ol sur

scioj pri la materio? – Kaj kiel oni ricevu tiujn sciojn nedonante sin mem tute al la materio, al vivo komplete envolvita en pensoj koncerne movojn, vibrojn, ondolongojn, rapidecojn, tempon kaj spacon, mezuron kaj pezon. La senviva materio tiel konstituas la kompletan aŭ ĉionsuperombran objekton de la vivintereso. Kaj ĉu ne unu post alia natursocioj iom post iom venis en la sferon de la moderna civilizo? – Kaj ĉu oni ne kredas, ke same okazos kun ĉiuj tiuj natursocioj, kiuj ankoraŭ vivas en la arbaroj kaj sur la sovaĝvastoj? – Kaj ĉu ne estas ĝuste fakto, ke per la riĉiĝo de la materia scio aŭ la pure materiisma scienco la kredokapablo mortas en la estuloj? – La lastaj tendencoj kredi je eklezia providenco aŭ dinocio ja antaŭ longe formortis ĉe la akedemiaj aŭ sciencaj kapacituloj en la materia sfero. Ne tiom estas la religio de la ekleziaj kristanoj, kiel estas ilia materia scio, pri kiu plejparte sopiras la indiĝenoj aŭ de kiu ili infektiĝas, kvankam kompreneble ankaŭ laŭ iu grado ili povas provizore trovi agrablon en la religiaj kredobjektoj de la civilizo kiel kompenson por ilia ankoraŭ ne tute mortinta religia instinkto.

Kiel ni vidis ĉi tie la mensa vojo aŭ spirita evoluo de la tera homo iras ekskluzive de stato de naturhomo al stato de kulturhomo, kiu plue laŭ konscio iras de instinkto al inteligento. Ĉar instinkto estas restaĵoj de estinta “kosma konscio”, “kosma klarvido” aŭ sensokapablo, kiu donas “rezultojn de la vivo”, la nura inteligento sekve povas doni nur “rezultojn de materio”, kiuj en si mem esprimas nur mezuron kaj pezon aŭ malvarmajn ciferojn. Tiel ni vidas la du grandajn vivprincipojn aŭ principojn de vivĝuado, kiuj en la Biblio estas esprimitaj kiel la arbo de vivo kaj la arbo de sciado.

**14. Tra mastroestado kiel ankaŭ tra sklavestado la viva estulo perdas sian mensan suverenecon**

Pri la arbo de sciado ni sekve jam orientiĝis. La manĝado de ĝi estas la samo kiel la ĝuado aŭ kontentiĝo de ĉiuj diversaj materiaj egoismaj avidoj. Tiuj avidoj pri avantaĝa materio (mono, havaĵo kaj oro) kaj la el ĝi rezultanta agrabla vivo fariĝis tiel forta, ke por la koncerna estulo la viva estulo aŭ la proksimulo iom post iom venis en la rolon kiel duaranga afero. Finfine tiu proksimulo fariĝis ekskluzive nur rimedo, pere de kiu ĝi eventuale povis atingi posedon de la dezirata materio aŭ la vivbonaĵoj, tute egale, kia fariĝus per tio la vivo de tiu proksimulo. Ke per tio tiu proksimulo fariĝis kaŝita aŭ kamuflita sklavo, kie tiu ekspluatado de la proksimulo ne povis okazi malkaŝe, tio estas memkomprenebla afero. Kiel alie laŭ agrabla maniero la materio povu transformiĝi avantaĝe al la egoisma estulo? – Fari tion mem ja tute ne estis tiel agrable kiel, se la proksimulo farus. La granda faktoro en la proprigo de la bonaĵoj de la vivo sekve pli kaj pli fariĝis tio, ke eblis igi la proksimulon preni la puŝojn, transpreni ĉiujn malfacilaĵojn, dum la bonaĵojn ellaboritajn per tiuj malfacilaĵoj povas transpreni la potencosupera egoisma estulo. Tiamaniere la terhoma vivo iom post iom aperis laŭ du formoj, nome la mastra stato kaj la sklava stato. Neniu el tiuj du materiaj estadoformoj estis naturaj liberaj formoj de la travivado de la vivo. La mastra vivo estis same ligita kiel la sklava vivo, kvankam ĝi ŝajne povis doni al ĝia praktikanto provizorajn materiajn avantaĝojn. Sed, ĉar nenio malpli ol tiuj avantaĝoj povis kontentigi la avidon de la egoisto, kaj ĉar plue tiuj avantaĝoj estis konserveblaj ekskluzive nur pere de sklavoj, la estuloj de la mastrovivo sekve fariĝis tute dependaj de tiuj “sklavoj”. Estulo, kiu evoluigis por

si tiel fortajn avidojn aŭ tiel troigitan apetiton pri la vivo, ke ĝi estas kontentigebla nur pere de la laborforto aŭ povado de pli aŭ malpli granda nombro de aliaj homoj, estas ja malliberigita de tiu povo. Tiun formon de estado, kiu por li signifas vivo kaj bonfarto, li ne povas havigi al si alimaniere ol per potenco subpremante siajn kunestulojn, tenante ilin senpotencaj tiel, ke li povas proprigi al si la produkton de iliaj laboroj. Tiel tiuj antaŭ longe ĉesis esti por li lia vera proksimulo, esti egalaj kunestuloj. Ili estas por li nur speco de estuloj, kiujn li necese tenas, ĉar li kutimiĝis al apetito pri la vivo, kiun li ne povas kontentigi per sia propra persona forto. Ili sekve estas nur speco de "dombestoj", kiuj plue estas konsidereblaj nur kiel speco de pli altnivela "inventaro". Sed laŭ sama grado kiel eblas koncepti aŭ senti la proksimulon nur kiel pecon de inventaro, kiel materion, la koncerna estulo ja ĉesis havi la kapablon "vidi homece". Ĝi sekve perdis sian normalan kosman vidon, pere de kiu ĝi alie devus vidi la proksimulon kiel "vivan kunestulon" kaj ne kiel nuran "rimedon", pecon de inventaro, kiun ĝi povas apliki laŭplaĉe. Sed tiamaniere povi vidi la vivan vivon nur kiel subordan senvivan materion, per kiu oni povas pilkludi aŭ kiun oni povas piedbati se plaĉas, estas ja la samo kiel ne plu kapabli travivi la reale vivantan aŭ la realan vivon. Sed perdinte iom el sia vido aŭ sia sensokapablo oni ja neeviteble estas malliberigita de tiu blindeco, kiun kaŭzas tiu perdo de travivadkapablo. La egoisma estulo, la mastroestulo, kies apetito pri la vivo estas tiel forta, ke ĝi estas kontentigebla nur tra ekspluatado de la proksimulo kiel "dombesto" aŭ materio, sekve estas laŭ responda grado mense malliberigita. Ĉi tie estas facile vidi, kiel la vortoj de la mondliberiganto estas scienco tie, kie li diras, ke estas same maleble por riĉulo eniri en la regnon de Dio, kiel estas por kamelo iri tra trueton de kudrilo. Veni "en la ĉielon" estas la samo kiel vidi la proksimulon, ne kiel "dombeston", ne kiel amason de materio, sed kiel "vivan estulon", kiun oni amas, kiel oni amas sin mem, kaj pere de kio la travivado de la vivo ne povas eviti esti permanenta raviteco kaj ĝojo.

Ke ankaŭ la sklava estado estas ligita fizika stato kaj per tio fariĝas sama mensa malliberejo, tio certe estas evidenta fakto por la plej multaj. Ĉi tie la estulo estas senigita je grandega parto de la frukto de sia propra laboro, nome je tiu parto, kiun rabas ĝia mastro. Sed perdi iom de la frukto de sia laboro signifas perdi iom de sia rajto, kio alivorte signifas iom de sia libereco. Kaj estulo, kiu perdis iom de sia libereco, estas ja laŭ sama grado malliberigita. Kaj la mastro kaj la sklavo estas ambaŭ mensaj vivokaptitoj. Ili ne havas iun ajn konscian suverenecon. Ili ambaŭ estas sklavoj de la materio. La mastro estas tiel dependa de kaj okupita pri la materio, ke li ne plu povas distingi inter la materio kaj la kunestulo. Por li la kunestulo estas nur rimedo aŭ ilo por la plenumado de lia avido. Kaj por la sklavo ankaŭ la mastro en la realo ĉesis esti proksimulo, esti kunestulo. Li fariĝis speco de naturforto, sorto, al kiu oni necese estas subigita por akiri la ĉiutagan panon. La mastro kiel ankaŭ la sklavo sekve estas unu por la alia necesa malbono. Sed estulo, kiu estas necesa malbono, estas sekve nur rimedo por la travivado de la vivo. Sed senti vivan estulon nur kiel rimedon, kiel nuran nemalhavigeblan ilon en la ĉiutaga vivo, tio ne estas koncepti ĝin kiel sian proksimulon. Tiu sinteno al la viva kunestulo aŭ la proksimulo neniam povas laŭ realisma rigardo fariĝi io alia ol nura travivado de materio. Kaj ĉar tia estulo amas nur sian edzkunulon kaj sian idaron, kiuj en iu maniero estas ĝiaj propraj karno kaj sango, per tio tiu

amo fariĝas nur simpatio por ĝi mem, do ĉio viva ĉirkaŭ tiu estulo fariĝas nur materio. Sed travivi ne nur la materion, sed ankaŭ la vivantan aŭ la vivon mem, la vivajn estulojn kiel materion, estas la samo kiel travivi nur la morton aŭ la senvivan, la viva estulo sur tiu stadio estas laŭ kosma rigardo nur senviva estulo. Sed vivi la vivon kiel senviva estulo estas la samo kiel vivi en mensa malliberejo. Tia konduto estas plue la kulmino de la kontrasto al la travivado de la suvereneco de la menso aŭ konscio, kiu suvereneco plue estas la samo kiel travivi la vivon kiel manifestaĵojn de vere viva estulo aŭ Dio.

**15. Kiam oni estas mastro de la materio ne estante servanto de la vivo**

Vidita laŭ tiu vidpunkto la ordinara tera homo havas ankoraŭ multe por deziri. Ĝi estas ankoraŭ tre tre longe for de mensa suvereneco. En la realo oni povas diri, ke ĝi kulminas precize en la malo. Plej altgrade ĝi vivas kiel mense malliberigita. Tiu malliberejo do konsistas el ĉio, kio apartenas al tiuj materioj aŭ materiaj aferoj, kiujn ĝi avidas laŭ tia grado, ke la kunestuloj, la viva vivo ĉirkaŭ ĝi, en la realo estas konceptataj nur kiel duaranga afero, kiel rimedoj aŭ iloj, pere de kiuj ĝi povas plenumi siajn materiajn dezirojn. En la mezo de tiu tuta materio aŭ sento de materio ĝi en la realo vidas nur sian propran mion. Ĉio temas pri tiu mio, ĉion ĝi deziras subigi al si. Kaj ĝuste ĉi tie ĝi venas en konflikton kun la vivoleĝoj. Laŭ tiuj leĝoj la viva estulo povas subigi al si la materion, sed ne la vivajn kunestulojn. La tera homo sekve frontas al du grandaj realaĵoj: la kunestuloj kaj la materio. Ĝia tuta sorto, ĝia vivtravivado, ĝia tuta mensa libereco aŭ ĝia mensa mallibero estas komplete dependa de ĝia rilato al tiuj du okazaĵoj, kiuj formas ĝian ĉirkaŭaĵon. La vivoleĝoj ordonas, ke la individuo aŭ la mio devas fari sin mastro super la materio, kaj servisto al la kunestuloj. La celo por la evoluo de la viva estulo, por ĝia spertoformiĝo, por ĉiuj ĝiaj travivaĵoj, agrablaj kiel malagrablaj, havas ekskluzive la taskon fari la individuon servisto de la vivaj estuloj. Sed ĉar la vivaj kunestuloj ja estas la samo kiel la vivo, kaj plue la vivo en la realo estas la samo kiel la Providenco aŭ Dio, do tio signifas, ke la viva estulo devas servi Dion. Ĝi devas evoluigi sin por vidi Dion en ĉiu ajn formo de vivo kaj sekve servi tiun formon de vivo.

Sed por fariĝi perfekta servisto de la vivo, ĝi devas unue fariĝi perfekta mastro super la materio. La materio nome estas la sola ekzistanta rimedo, pere de kiu oni povas servi sian proksimulon, la kunestulojn aŭ Dion. Sed por fariĝi vera mastro super la materio la viva estulo devas unue fari sin unu kun la materio. Ĝi devas lerni ami la materion same alte, kiel ĝi amas sin mem. Kaj estas tiu amo al la materio, kiu malkaŝas sin sub la nocio posedrajto. Kiam la estulo deziras aŭ avidas posedi aŭtomobilon, flugmaŝinon, palacon, kastelon, kapitalon, servistojn, sklavojn ktp. ekskluzive pro sia propra agrablo aŭ ekskluzive nur por servi sin mem pere de tiuj aferoj, do ĝi posedas totalan aŭ absolute perfektan amon al la materio, sed havas neniun amon al la proksimulo aŭ la kunestuloj. Ĝi ne plenumas la vivoleĝojn aŭ tiujn kondiĉojn, kiuj necesas, por ke la individuo povu esti unu kun la naturo, unu kun la vivo, kio signifas posedi “kosman konscion” kaj per tio senti la pulsan baton de la mondotuto, de Dio aŭ de la plej alta vivo. Sed kiam ĝi ne plenumas la vivoleĝojn, ĝi laŭ responda grado malgrandigas sian veran vivtravivadon. Laŭ sama grado kiel ĝi amas la materion avantaĝe al si mem pli ol avantaĝe al la kunestuloj aŭ la proksimulo, ĝi sekve kreas malharmonion ĉirkaŭ si, ĝi mallumigas la vivon. Estas tiu mallumigo, kiun ni nomas primiti-

veco, malfeliĉaj sortoj, peko, infero aŭ la malbono. Tiuj menciitaj aferoj estas la absolute neeviteblaj efikoj de la avido pri aŭ la amo al la materio kaj la el tio sekvanta apero kiel mastro de la materio sen esti servisto de la kunestuloj aŭ de la vivo.

**16. Tio, kio eraras en la apero de la tera homo**

Sed kiam la estuloj vivas ne farante sin servistoj de la vivo, kiel la vera vivo do floru aŭ atingu sian veran destinon, plenumi sian specialan celon. Kiuj aliaj devas fari la vivon perfekta kaj sekve la sorton feliĉa, se ne la viva estulo mem? – Kial ĝi ne same bone povu fari sin servisto de la vivo, kiel ĝi faris sin mastro de la materio? – Ĉu devus esti pli malfacile doni al sia proksimulo pardonan manon kaj komprenan kaj varmigan kareson ol estas flugi super la nuboj kaj ŝipi sub la akvo? – Ĉu oni ne same bone povas evoluigi sin por havi paron da mildaj kaj amemaj okuloj por direkti al sia proksimulo, kiel oni povis evoluigi ĉe si cerbon, kiu kapablas pesi la sunon kaj mezuri la iradon de la steloj kaj tra la mikroskopo rigardi en mikrokosmon kaj tra la teleskopo orienti sin milojn da lumjaroj en la makrokosmo? – Por kiu utilo estas tiu grandioza povado, tiu grandioza talentaro, tiu grandioza reganteco super la fortoj, kiam tio okazas ekskluzive favore al oni mem kaj sekve je malfeliĉo kaj damaĝo por onia ĉirkaŭaĵo? – Ĉu oni ne kredas, ke tiu grandioza evoluo de la fizika cerba kapablo kaj la el tio sekvanta povado devas esti utilo por la vivo anstataŭ esti ĝeno por ĝi? – Ĉu oni kredas, ke tiu grandioza mensa evoluo de la individuo devas esti agrablo nur por ĝi mem kaj je detruo de ĝia ĉirkaŭaĵo, kiam ĝi efektive povas esti ĝojo, ne nur por ĝi mem, sed ankaŭ por la ĉirkaŭaĵo? – Ĉu estus logike supozi, ke tiu lasta afero ne estas la intenco de la vivo? – Ĉu ne estas ĝuste tial, ke multaj belaj urboj kaj kulturaĵoj de la tero hodiaŭ estas ruinaĵoj, ke milionoj da homoj estis mortigitaj aŭ korpodifektitaj? – Ĉu oni kredas, ke estas la intenco de la vivo, ke la estulo laŭ "la bildo de Dio" devas lamiri sur artefaritaj gamboj doni manpremon per artefarita mano aŭ ĉirkaŭbraki siajn karulojn per brakoj el metalo? – Tio, ke la tera homo fariĝis mastro super la materio ne donis al ĝi veran aŭ realan feliĉon. Meze en sia materia mastreco ĝi krias pri daŭra paco, kio plue fakte signifas realan daŭran feliĉon.

Sed, kiam la apero de la individuo kiel "mastro" de la materio ne donis al ĝi la veran feliĉon, sed kontraŭe metis ĝin en situacion, kiu ĝuste krias pri tiu feliĉo, do tio montras kiel fakton, ke ĝia vivo kiel mastro de la materio ne estas la fina celo por la evoluo de la tera homo. Sekve la celo por tiu evoluo povas ekskluzive esti nur tiu paco. Sed por atingi tiun pacon aŭ tiun celon, ĝia vivo sekve necese devas ŝanĝiĝi. Tio, ke ĝi fariĝis mastro de la materio, ne povas esti sufiĉa. Kio estas do tio, kio eraras en la aperado de la estulo? – Ĉu ne estas ĝuste, kiel ni jam antaŭe tuŝis, la aplikadon de tiu reganteco? – La estulo uzas sian regecon super la fortoj aŭ la materio avantaĝe al si mem. Kaj en sia fervoro aŭ nesatigebleco en materia avido ĝi ne povis sensi aŭ vidi, ke ĉia aplikado de materia povo ekskluzive avantaĝe al si mem same ekskluzive povas konduki nur al detruo, ĝeno kaj sufero por la ĉirkaŭaĵo. Ĝi sekve ne komprenas, ke la celo por fari la individuon mastro de la materio estas ekskluzive fari ĝin perfekta servisto por la kunestuloj. Servisto, kiu ne estas mastro super la materio, ne povas esti perfekta servisto por sia proksimulo aŭ sia ĉirkaŭaĵo. Tial troviĝas tuta serio de stadioj en la spiralciklo, kiuj estas destinitaj ekskluzive kiel evoluejo por la edukiĝo de la individuo subigi al si la materion. Kaj krome

la estulo nun venis en tiun evoluon, ke ĝi subigas al si la atomforton, malantaŭ kiu ekzistas ĝis nun nekonataj kolosaj amasoj da energio, tiel ke per ĝi la individuo povas detrui ĉian kulturon, ĉian homan kreaĵon, kaj ĝi daŭre faras multajn esplorojn por eltrovi, kiel oni plej efike faru ĝin ĉiondetrua kaj mortiga por la kunestuloj. Ĉu oni ne kredas, ke la intenco estas, ke tiu grandioza fortofonto, same kiel ĉiuj ceteraj fabelaj formoj de teknika kaj kemia povo, kiun la teraj homoj proprigis, devas esti uzataj avantaĝe al sia proksimulo, kio signifas avantaĝe al ĝiaj kunestuloj kaj ĉirkaŭaĵo. Ĉu oni ne kredas, ke la eksterordinare granda talentaro devas esti uzata avantaĝe al la kreado de feliĉa vivo por ĉiuj kunestuloj?

### 17. La maniero, laŭ kiu oni kreas la sopire atendatan "daŭran pacon" aŭ perfektan feliĉon aŭ travivadon de la vivo

Sed kiel krei tian feliĉan estadon aŭ la daŭran pacon, pri kiu sopiras ĉiuj teraj homoj, kaj kiu estas anoncita tra la kristnaska evangelio? – Ĉu ne estas tiel, ke la ĉefa persono de la kristnaska evangelio ĝuste donis la preskribon de tio? – Ĉu li ne mem diris: "Mi ne venis por igi min servata, sed por servi". Ĉu li ne ankaŭ diris, ke la servisto estas same granda kiel la mastro? – Ĉu ne plue diriĝas: "Amu vian proksimulon kiel vin mem, de tio dependas la tuta leĝo", same kiel li ankaŭ esprimis: "Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al alia", kaj ke "pli feliĉe estas doni, ol ricevi", kaj "neniu havas amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian vivon por siaj amikoj". Ĉu ne estas ankaŭ de li, ke ni havas la deklaron, ke "Kiu penos gajni sian animon, tiu ĝin perdos, sed kiu ĝin perdos, tiu savos ĝin viva"?

Ĉu ne ĉiuj tiuj frazoj esprimas montradon de tio, ke oni devas servi sian proksimulon, vivi por li same kiel antaŭe oni vivis plene por si mem? – Oni devas eĉ ami lin tiel, kiel oni cetere nur kutimas ami sin mem. La tuta menso de la individuo sekve devas esti amo. Sed kio estas amo? – Ĉu amo ne estas precize kaj ekskluzive la avido doni al sia proksimulo feliĉon kaj ĝojon? – Kaj ĉu kontentiĝo de tiu avido ne laŭ sama grado estas precize la ĝojo vidi siajn kunestulojn kaj ĉirkaŭaĵon aŭ tiun proksimulon plene aŭ perfekte feliĉaj.

Ĝis nun la tera homo atingis antaŭen por esti mastro de la materio, kio signifas esti mastro super la elementoj, povas igi ilin labori por si tra grandiozaj fortomaŝinoj kaj cetere havas grandiozajn scion kaj talentaron en la pure fizika aŭ materia sfero, povas igi la materion perfekte obei al sia penso, kaj tial tiu estulo ja nun havas grandiozajn cirkonstancojn aŭ eblecojn por povi ami, kio signifas: servi al sia proksimulo. Ĝi nun havas ĉiujn cirkonstancojn por povi esti kunaganta rimedo en la dia transformado de la tero el "suferejo" al vera paradizo. Kiel perfekta mastro de la materio ĝi nun povas fariĝi perfekta servisto de sia proksimulo kaj sekve de la vivo.

### 18. Tio, kio ŝanĝas "la beston" al "homo"

Tio, kio nuntempe malhelpas al la tera homo esti feliĉa, sekve estas ekskluzive tio sola, ke ĝi ankoraŭ ne lernis, ke la feliĉo ekzistas absolute nur en formo de vivado avantaĝe al sia proksimulo, al la ĉirkaŭaĵo aŭ la kunestuloj. Ankoraŭ ĝi vivas en la konscisinteno heredita de la bestoregno: "Ĉiu por si mem estas la plej kara" kaj praktikas tiun sentencon per ĉiuj disponeblaj rimedoj kaj sekve ĵetas sin en la malfeliĉon kaj la suferojn. Oni nome povas esti avantaĝo por si mem nur tra tio, ke oni estas avantaĝo por sia proksimulo.

Estas ĝuste, ke en la regionoj aŭ ceteraj sferoj de la bestoregnaj regionoj

la bestoj ne havas alian elirvojon aŭ vivmanieron ol ĝuste tiun, esti avantaĝo por si mem. Ĝi estas ordonita de la kunnaskita sinkonserva instinkto. Sed por la tera homo tiu vivmaniero ne plu estas vivkondiĉo. Ĝi havas sian alte evoluintan inteligenton kaj pensokapablon. Ĝia kapablo rezoni pliigis la pensokapablon, tiel ke ili kapablas praktiki tute alian kaj multe pli perfektan manieron laŭ kiu vivi. Ĝi ne estas kiel la besto devigita vivi ĉefe surbaze de sia instinkto, sed povas pere de sia maldorma klara tagokonscio enviviĝi en la konduton de sia ĉirkaŭaĵo, en iliajn naturajn kaj neeviteblajn postulojn. Nekomprenante tiujn postulojn al oni kiel io rajta, oni konceptas ilin kiel nerajtaj. De tio venas la frazo: "Ĉiu por si mem estas la plej kara". Dum tiu vivoformo estas la absolute plej perfekta por la besto, ĝi fariĝas por la pensanta aŭ la intelekta homo tiu ĉeno, per kiu ĝi komplete ligas sin mem al la plej malfeliĉa formo de sorto, kiu entute estas travivebla. Ĉe la besto ekzistas, krom ĝia pariĝa instinkto aŭ kunula principo, ne io alia ol la principo de potenco. Ĉi tie validas nur la rajto de la pli forta. Tial ĉi tie temas ekskluzive nur pri ia maniero, laŭ kiu fariĝi la plej forta. Se ĝi ne povas fariĝi la plej forta laŭ pure fizika aŭ korpa mezuro do tamen laŭ la pure mensa, kio ĉi tie signifas por kamufli, por trompi siajn pli fortajn ĉirkaŭulojn tiel, ke per ruzo oni povas venki ilin. Kaj ĉar tiuj fortoj troviĝas en la besto kiel ĉiorega kutimkonscio, kaj ke ĝi ankoraŭ ne havas kapablon povi pense aŭ rezone atingi alian vivoformon, tiu sama vivoformo povas esti nur la plej alta virto de la besto. Kaj la sola formo de libereco, kiun la besto kapablas travivi, sekve estas ekskluzive tiu, kiun per sia potencosupereco aŭ sur la korpa aŭ sur la trompa regiono ĝi kapablas garantii al si. Sed ĉar daŭre troviĝas batalo pri la teritorio de potenco, kaj tiu estas neforigebla kondiĉo por la besto, tiu estulo sekve estas absolute malliberigita aŭ ligita al tiu batalo. Ĝi ne estas libera estulo. Ĝi devas daŭre ĉasi kaj sekve vivi en permanenta batalo kun la ĉirkaŭuloj. Sed surdevigita permanenta batalo sekve povas esti nur mensa aŭ fizika ligilo, ja esti ia psika mankateno. Estas la kontraŭbatalo de tiu fizika aŭ psika malliberiĝo, kiu ŝanĝas la beston al homo.

**19. La estiĝo de la perfekta homo tra la amo al la proksimulo aŭ la plenumo de la senco de la vivo**

Perfekta aŭ finevoluinta homo do estas estulo, kiu estas liberigita de tiu besta vivoformo aŭ vivmaniero. Ĝi tiom antaŭen progresis en kontraŭbatalo de la menciita vivoformo aŭ vivmetodo, ke ĝi estas komplete venkita. Ĝia vivo aŭ apero ne plu estas io, pri kies konservo ĝi devas batali kontraŭ aliaj estuloj. Ĝi ne plu estas plenigita de la tendenco praktiki la principon "ĉiu por si mem estas la plej kara", sed kontraŭe estas tute plenigita de la kompleta malo de tiu vivoformo: "por ĉiu la proksimulo estas la plej kara". Ĉar tiu vivoformo povas realiĝi aŭ manifestiĝi ekskluzive tra la ĝojo "pli feliĉe estas doni, ol ricevi", kaj tiu vivoformo ĉiam estas al la ĉirkaŭuloj precipe agrabla aŭ bonvena, tiuj ĉirkaŭuloj iom post iom sentas tian estulon kiel sian absolute veran amikon. Ili komencas ami lin. Kaj tiuj, kiujn oni amas, oni servas. La ĉirkaŭuloj sekve fariĝas servanto de tiu estulo. Tio, kion la menciita estulo semas, ĝi tiel komencas rikolti. Ĉu oni povas imagi pli perfektan rilaton ol tiun, ke estulo amas siajn ĉirkaŭulojn kaj estas reamata de ili? – Kaj kiel oni kredas, ke en iu ajn alia maniero la vivo povu esti travivata kiel absolute feliĉa kaj sekve kiel perfekta? – La sorto de la individuo ja estas ekskluzive fiksita de du faktoroj, nome: ĝia propra memo kaj ĝia proksimulo, kiu plue estas la samo kiel ĝia apero

kiel individuo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, ĉio kaj ĉiuj senescepte. Tial en la realo troviĝas nur du formoj de sorto. La individuo povas aŭ malami siajn ĉirkaŭulojn, aŭ ĝi povas ami ilin, kio estas la samo kiel tio, ke ĝi povas malami aŭ ami sian proksimulon. Se ĝi malamas la proksimulon, tio esprimas, ke ĝi estas en skismo aŭ konflikto kun la vivo kaj sekve kun la feliĉo kaj kredas, ke la proksimulo estas kaŭzo de tiu konflikto kaj de la el tio sekvanta reteno de ĝia feliĉo. Per tio ĝia menso estas laŭ responda grado malliberigita aŭ ĉenita de la avido aŭ inklino ekstermi aŭ forigi tiun proksimulon, ĉar ĝi kredas, ke tiu ekstermo estas savo de ĝia feliĉo. Ĝia ĉasado pri liberiĝo montras, ke ĝi estas ligita estulo.

Se kontraŭe ĝi amas sian proksimulon, tio esprimas, ke ĝi vivas en kontakto kun la vivo. Pro sia amo al la proksimulo, ĝi ne frontas al iu estulo, kiun ĝi deziras ekstermi aŭ forigi. Ĉar ĝia deziro aŭ avido estas ekskluzive favora al la proksimulo, ĝi finfine tute ne renkontas ĝenon aŭ retenon en sia vivdisvolvo fare de la proksimulo, ĉar sub normalaj cirkonstancoj tiu ja ne estas interesita subfosi tion, kio estas favora al li mem. Ricevi tian transformiĝon al sia menso, ke onia plej alta feliĉo aŭ kontentiĝo de avido estas ekskluzive tio sola esti favora al la proksimulo, tio sekve estas la absolute sola, kio povas garantii al la viva estulo travivadon de la plej alta kontakto kun la vivo, kontakto, kiu signifas la totalan suverenecon. La unua el la du antaŭe menciitaj konscifaktoroj do kondukas al kompleta mensa malliberiĝo, al sklaveco en la materio, kio plue signifas sklavecon de materiaj avantaĝoj aŭ ŝajnaj bonaĵoj, dum kontraŭe la alia faktoro kondukas al kompleta liberiĝo el la avido pri tiuj bonaĵoj avantaĝe al amo al la proksimulo, kio kiel jam konate estas la samo kiel la amo al la kunestuloj en la ĉirkaŭaĵo de la individuo. Sed tiel ami sian proksimulon estas ja la samo kiel realigi tiun manifestoformon, kiu estas la senco de la vivo.

Sed esti en kontakto kun la senco de la vivo estas la samo kiel esti imuna al ĉia ajn konflikto kun tiu senco. Kaj tiu imuneco estas la absolute sola, kio povas garantii la perfektan aŭ plej altan feliĉon kaj la el tio sekvantan respondan ĝojon pro la ekzistado. Atingi tiun konscistaton aŭ manifestoformon do estas la samo kiel esti unu kun la vivo, kio plue estas la samo kiel esti "unu kun la Patro".

### 20. La travivado de la viva estulo pri la plej alta suvereneco, senmorteco, kaj kiel identa kun la bildo de Dio trans tempo kaj spaco en tuta eterneco

Kaj kun tiu vivoformo komenciĝas tute nova estado. De la stato kiel besto, kiu povas konservi sian vivon nur pere de mortigado aŭ korpodifektado al sia proksimulo kaj sekve povas konservi sian vivon ekskluzive pere de la kadavroj de la ĉirkaŭaĵo, oni fariĝas estulo, kiu konservas sian estadon ekskluzive per donado de vivo, kio alivorte signifas: elradiadon de amo al ĉio kaj ĉiuj kaj per tio akceli, stimuli aŭ inspiri al la plej alta ĝojo de siaj ĉirkaŭuloj pro la ekzistado. Sed per tio onia principo de manifestado ja fariĝas komplete analoga aŭ identa kun la principo de la suno mem. La sunprincipo estas ja la plej alta principo de fizika energidisvolvo, kiu entute ekzistas. Estas nome tiu, kiu estas la fundamento por la kreado de la tuta tero aŭ ĝia formiĝo al tiu rava planedo, kiu ĝi iom post iom fariĝis tra siaj diversaj milionjaraj evoluepokoj. Tiel la sunprincipo kaŭzis, ke nuntempe la tero aperas kiel perfekta "paradiza ĝardeno" kun ĉiaj eblaj kondiĉoj por per siaj belaj kampoj kaj arbaroj, oceanoj kaj ĉielo povi doni al la homaro abundan sferon akcelantan vivemon kaj ĝojon, kiam tiu

homaro estos finmortiginta aŭ alimaniere finsabotinta sian kapablon transpreni tiun dian sferon en kontakto kun la volo de la Providenco, kaj per tio montriĝas fakto, ke la sunprincipo estas la plej dia principo de energidisvolvo, kiu ekzistas. Sed, kiam ĝi tiel estas la plej perfekta formo de energidisvolvo aŭ la plej perfekta kreometodo, kiu ekzistas, do samtempe ĝi estas la plej perfekta modelo aŭ la plej bona dia modelo por la evoluo de nia propra energidisvolvo aŭ la volgvidado aŭ manifestado subigita al nia propra mio. La suno, tiu dia plej alta lum- kaj varmofonto kaj la kaŭzo de ĉia tera ravaĵo kaj paradiza vivebleco, brilas, varmigas kaj lumas por la tiel nomata malbonulo kiel ankaŭ por la tiel nomata bonulo. En neniu ajn okazo ĝi elradias ian ajn formon de mallumo, ĝi eĉ ne povas krei la plej etan formon de ombro en aŭ sur io ajn. La suno estas lumo kaj varmo kaj povas esti nur lumo kaj varmo. La ombroj aŭ la mallumo ne devenas de la suno, sed povas deveni nur de malhelaj aferoj, kio signifas aferojn kiuj estas malhelpo por la lumo kaj forto de la suno. Ĉie, kie troviĝas mallumo, ne estas la suno, sed kontraŭe tute aliaj aferoj, kiuj ĵetas fortan ombron kaj envolvas pli aŭ malpli grandan parton de sia ĉirkaŭaĵo en mallumo. Tiuj aferoj forbaras la lumon kaj varmon de la suno kaj sekve malhelpas per siaj ombroj la aliron de aliaj estuloj al la vivofonto. Sur sia vivovojo tra la mondospaco ili ĵetas post si mallumon, nokton, malvarmon kaj morton. Kie la lumo de la suno forbariĝas, tie prosperas nur blindeco, ŝlimo kaj veneno, ŝimo, mucido kaj senkoloreco. Kie kontraŭe aperas la lumo de la suno, tie fariĝas elrigardo, perspektivo kaj koloro, ridetado, ĝojo kaj vivemo. Kie troviĝas pli granda esprimo de moralo ol tiu, kiun ni trovis en la steloj? – Ĉu ne tra la lumo de la suno Dio diras al ni la samajn grandajn verojn kiel tiujn, kiujn tra jarmiloj li rakontis al la homaro pere de la profetoj, la grandaj saĝuloj aŭ la mondliberigantoj? – Kion signifas tio, ke libroj pereas, ke religioj malnoviĝas, ke materiismo estiĝas, ke floras naivaj kaj neperfektaj homaj ideoj, kiam en dia majesto de la malhela nokta ĉielo la eterna Patro eterne malkaŝas sian volon en formo de la lumo de la suno kaj esprimas la strukturon de sia propra bildo kaj per tio sian vivoformon, sian moralon, sian vidon je vivo kaj estado, sian karesadon de la malbonuloj kiel ankaŭ de la bonuloj, sian primontron de tio, kio donas vivon kaj kio donas morton kaj sekve faras la ĉielon sia viva vorto?

Tra la fajro de la suno Dio diskonigas sian planon por la viva estulo. En la radioj de la suno la eterna Patro esprimas sian aman mesaĝon al sia “perdita filo” aŭ al ĉiuj animoj en la mallumo tiel:

*“Vidu, mi estas la releviĝo kaj la vivo, ĉiu, kiu praktikas mian vivoprincipon, devas ekvidi sian propran senmortecon kaj transvivi la tempon kaj la spacon kaj vidi, ke ĉio estas tre bona. Li estas mia vera bildo kaj estas unu kun mi en sia vivovojo trans la tero, trans la homaro, tra la universo. Li ripozas en mi kaj mi en li. Per tio li fariĝis la vojo, la vero kaj la vivo. Li fariĝis unu kun la eterneco, la ĉiopovo kaj la amo”.*

Trad. Ib Schleicher



KOSMOS 1939, n-ro 1, p. 7

# Martinus I Enkonduko

de Erik Gerner Larsson



Nuntempe kiam mallumaj nuboj kovras la plej grandan parton de la spirita ĉielo sur la tero, kaj kiam en la animo de multaj homoj kreiĝas malĝojeco kaj melankolio, tiam malfortan lumbriladon de superfizika sfero ekdissemis beno en la nordo. Vibrante trans animo el unu sola viro, ĝi jam alvokis tiel grandan atentecon, kiel taga gvidantstelo por pli kaj pli da homoj. La nomo de tiu viro estas Martinus kaj la supre menciita brilado estas la kosmaj analizoj, kiuj pere de li nun arpartenas al ĉiu intelekta homo.

Sed ties lumo, kies profunda karaktero estas informado al homoj de la tuta mondo, tamen ne toleras sin bari per landlimoj. Kvankam la laboro de tiu viro estas epokfaranta de komenco, la tempo ekde nun venis por aliaj homoj ol la danaj. Ili ĉiuj havas rajton al tiu scio, kiu povigas la saĝon al interna paco kaj harmonio kontraŭ malnovaj religiaj konceptoj. Kiel multjaran konatulon kaj sekretarion de Martinus, li petis min skribi monatan artikolon al "Kosmos" en Esperanto, kaj partoprenigi la animparencojn de la tuta mondo al tiu idea materialo al kiu lia misio estas decidita plenumi.

Kiam li elektis tion fari per Esperanto, estas pro du kaŭzoj. Unue: ĉar li opinias ke la plej multaj esperantistoj tra la mondo estas homoj, kies toleremo kaj internacieco estas denaskaj, due: ĉar la simpla atingebla helplingvo jam nun estas tiel disvastigata kaj estonte feliĉe sukcesos, ke lia laboro iom post iom per traduko, estos konata ĉe la plej malproksimaj regionoj kaj tie tradukota al lingvo de la interesuloj.

Por ke la enhavo de ĉi tiuj artikoloj ne deprenu la legantojn de "Kosmos", estas ankaŭ lia deziro, ke ĉiu numero enhavu artikolon dane kaj en Esperanto. Tia aranĝo ankaŭ havas profiton; ĉar la legantoj tiam studos kaj eble deziras lerni la lingvon. Cetere estas opinio estonte fari kurson per la jam ekzistanta instruado en la ĉefverko de Martinus "La Libro de la Vivo".

Antaŭ la venonta artikolo, kies enhavo fariĝos la mondbildo de Martinus, mi finas la unuan artikolon per elparolado de li mem, laŭ lia ĵus eldonita libro "Logiko":

"Ĉar mia laboro ne fariĝas asocio de iu formo, estas la aliĝo ne per helpo de membro-karto, sed ekskluzive per intereso kaj simpatio al esplorado de la eterna fakto esprimita, kaj per ĝia literaturo, instruo kaj paroladoj atingeblaj.

Ĉiuj, kiuj ligas sin al mia laboro, estas kaj restos nur liberaj esplorantoj, ne havante ian asocion aŭ kunfratarstampon."

*Poul Lendorff,*
Tradukanto.

# EL LA MONDO

**"Martinus, Darwin kaj inteligenta dezajno" en kroata lingvo**
En majo 2007 la libro "Martinus, Darwin og intelligent design" verkita de Ole Therkelsen eldoniĝis en dana eldonejo Borgen. Post bona vendado dua eldono aperis en 2008. La tuta dana eldonkvanto nun estas 1250 + 650 = 1900 ekz.

El angla lingvo Davorin Gruden tradukis la libron en la kroatan lingvon, kaj en marto 2009 la kroata Martinus-Centro endonis la libron kun kroata titolo "Martinus, Darwin i inteligentni dizajn". Germano Henry Nold sponsoris la lokan centron kaj la eldonon. La nova libro estas aĉetebla ĉe www.martinus-cro.net.



Tradukinto Davorin Gruden kaj verkinto Ole Therkelsen

---

**Mary McGovern tradukis "Livets Bog 4" en la anglan lingvon**
La plej granda novaĵo en la angla kampo estas, ke la Instituto eldonis la anglan tradukon de la kvara volumo de "Livets Bog" (La Libro de la Vivo 4), kiu estas la plej dika el la 7 volumoj de Livets Bog. Grandan dankon al skotdevana Mary pro tiu granda kaj bona laboro.

*/Ole Therkelsen*

---

**Kvin paĝoj pri Martinus en libro en angla lingvo**
Per Madsen de A.R.E. (The Association for Research and Enlightenment, "Edgar Cayce Center", Virginia, USA) skribis libron "Understand and Working with Life's Mysteries" (Kiel kompreni kaj labori pri la misteroj de la vivo). La libro estas aĉetebla ĉe www.amazon.com.

*/Ole Therkelsen*

INFORMO PRI

## LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento.
La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la Interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

La frontapaĝa bildo: © Jamalludin Bin Abu Seman Din | Dreamstime.com

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 38 34 62 80
fakso (+45) 38 34 61 80
Telefontempo:
lundo-ĵaŭdo 13-16
vendredo: 9-12
DK p.ĝiro 642-9580
UEA-kodo mins.d
www.martinus.dk
info@martinus.dk
www.shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen (respondeca), Helen Claesson kaj Jonas Dalmose.
Kompostado: Vibeke Falk kaj Dan J. Elhaŭge.

Abono: Jare 2 ekzempleroj
Prezo en EU: DKK 70,00 aŭ EUR 9,40
Prezo ekster EU: DKK 56, EUR 7,50 aŭ USD 9,60
Unuopaj kajeroj: DKK 35,00
Se vi ne povas pagi per fremda valuto, demandu al la Instituto

Kopirajto: © Martinus Idealfond 2009
Redono de teksto nur laŭ skriba permeso.
ISSN 1600 4116.

# La Kosmologio de Martinus

**Martinus estis dana verkisto (1890-1981)**
La kosmologio de Martinus estas spirita scienco. Ĝi priskribas la eternajn principojn, leĝojn kaj bazajn energiojn, kiuj fundamentas la spiritan kaj fizikan mondojn. Laŭ kosma konscio ĉio estas viva, eĉ de la atomo en mikrokosmo, de plantoj, bestoj kaj homoj en mezkosmo al galaksisistemoj en makrokosmo. La universo estas unueca organismo, viva estulo.

La mondo ĉiam evoluas. Por kompreni la evoluon de besto al homo oni bezonas la pensojn pri reenkarniĝo, sorto kaj karmo. La homaro nun spertas suferojn kaj mal-lumon. Iom post iom tio kaŭzas en ĉiu homo evoluon al logika pensmaniero, al pli humana sinteno kaj homama kapablo. Tio estas la provizora celo de la evoluo. La plej gravan instruadon donas al ni la vivo mem. Ni ĉiuj estas naturaj membroj de tiu lernejo. Tial la kosmologio de Martinus ne havas iajn ajn membrecon, unuiĝon aŭ asocion. Sed ĝi celas doni al la unuopa homo komprenon pri la eternaj vivleĝoj, kaj helpi al ĉiu interesato fariĝi memstara kaj kapabla mem vivi homame, logike kaj tolereme.

Pro komenciĝanta amkapablo la homaro iam forlasos la bestoregnon kaj la mortigan principon kaj kreos internacian, pacan mondregnon.

Studado de la kosmologio donas al vi helan kaj optimisman vivkomprenon.

# Martinus-Centro en Klint, Danio



**Kurso en esperanto pri la kosmologio de Martinus**

**01.08 - 08.08.2009**